

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-o 41, 17. Julio 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

Morto de Antoni Grabovski.

La unua publika Esperanto-Ekzameno en Budapest.

Pli ol 2100 Partoprenantoj por Praha. - Monumento por D-ro Zamenhof.

Antoni Grabovski.

Mi skribas sub terura influo de la la jus okazinta malĝoja fakto, korploriga novaĵo por la tutmonda esperantistaro. Hodiaŭ (4. julio) la morto forbaris de ni denove unu el niaj plej fruaj kaj plej meritplenaj samideanoj, la pacbatalanton Inĝ. Antoni Grabovski, direktoron en la Esp. Akademio, aŭtoron de multaj esp. verkoj kaj plej faman esp. poeton.

Grabovski naskiĝis la 11. junio 1857 en Novembro ĉe Chelmo apud Vistulo, vizitis la gimnazion de Torun (Thorn), studis ĉe Universitato Breslaŭ filozofion, lingvojn, natursciencojn kaj kemian teknologion.

Li estis — post Zamenhof — la unua esp. aŭtoro. Jen nur kelkaj el liaj multnombraj verkoj: Malgranda kaj granda vortaro pola-esperanta; Mazeppa; Halka; Kondukanto kun Antologio; Parnaso de Popoloj; Tagiĝo; Sinjoro Tadeo. Li estis longjara amiko de la Majstro, longtempe prezidanto de Pola Esp. Societo kaj lastatempe ĝia honora prezidanto.

En la lasta tempo la sanstato de nia samideano pli kaj pli malboniĝis, kaj li tre suferis je la koro. La morto lin trafis subite, kiam li estis rigardanta esperantistojn elpendigitajn malantaŭ la fenestro de nova esp. oficejo de s-ano Mieczyslaw Klein en Marszalkowska 91. Li falls apud la magazeno kontraŭ la muro.

Grabovski vivis por Esperanto kaj mortis kun esp. pensoj. La Varsovia samideano profunde funebras pro la sortobato, kiu ĝin trafis per la perdo de ĝia ŝatata estro, kaj kun ĝi funebras la tutmonda esperantistaro.

La enterigo okazos la 8. julio, je 11 h.

Varsovio, 4. julio 1921.

Adolfo Oberrotman.

Neatendita Sukceso.

Unua publika Esperanto-ekzameno en Budapest.

Tiel bela, familia kaj tamen impona festo eĉ la silvestra kaj pasklunda tevesperoj ne estis, kiel nun la ferma ekzameno de la kurso de s-ano Julio Baghy la 4-an de julio, lunde posttagmeze je la sesa; la alitempe malafabla ĉambrego de la Socia Muzeo estis kvazaŭ familia hejmo pro la lerta aranĝo kaj ornamo. Belaj afiŝoj pentritaj de s-ano Bayer kun sentencoj de s-ano Baghy ornamis la estradon, super kiu pendis la verda flago kun bildo de Zamenhof inter girlandoj. La tuta ĉambrego estis ornamita per girlandoj, sur la tablo belaj floroj por la „profesoro“ de la „lernantoj“. Sur la muro afiŝetoj, alvokoj, gazetoj, la „Triumfonta“, la „Hungara Esperantisto“ kaj aliaj. En la aero vera esperanta sento, kiu tiel malofte sukcesas trapenetri la hodiaŭan mizeran vivon kaj kiun oni tiom pli entuziasme enspiras.

La ekzameno estis eĉ antaŭanoncita en kelkaj gazetoj, kaj kelkaj journaloj sendis oficialajn raportantojn. Ankaŭ multaj gastoj venis, do proksimume cent personoj ĉeestis, kiam s-ano d-ro Béla Rácz per kelkaj malfermaj vortoj salutis la ĉeestantaron. S-ano Baghy komencis ekzameni la dek ses lernantojn, duone knabinojn, inter ili respondis ĉiun demandon — ĉu tiuj, kiuj lernis de dek monatoj; ĉu tiuj, kiuj lernis nur de tri monatoj, per korekta sia esp. parolo: jen la demandojn pri historio de Esperanto, jen pri gramatikaj finiĝoj, jen pri vivo de Zamenhof aŭ pri literaturo de nia lingvo. Ne estas loko aparte menciil ĉiujn ekzamenintojn, sed se ĉiu kurso tiel finiĝos, certe nur bonaj esperantistoj ekzistos. Kaj ni ne forgesu: preskaŭ ĉiu el ili je la fino de sia ekzameno deklamis poemon, kelkaj eĉ el la belaj poemoj de Baghy mem. Do estis vere literatura ĝuo. Iu klarigis la verkadon de Privat, alia fraŭlino parolis pri la verko de Madách „La tragedia de la homo“. La altnivela kaj bonega unuhora ekzameno forte impresis ankaŭ la esperante ne komprenantajn aŭskultantojn.

Dume alvenis monsinjoro Giesswein, kiun oni salutis per levigo. Li ridetante kapjesis al la respondantoj kaj estis tre kontenta pri la rezultatoj. Nur kiam iu menciis la diron de Privat, ke al esperanta movado aliĝu la junuloj, ĉar la maljunuloj baldaŭ morfos, li interdiris: „Sed ne ĉiuj!“ La bona humoro regis tra la tuta ĉambro. Kaj

la entuziasmo kreskis, kiam Giesswein levigis kaj esperantlingve alparolis la novajn samideanojn. Li parolis pri nunaj malhelaj tempoj. La nuna generacio kreskis dum la milito; ĝi ne multon scias pri la mondo, sed la maljunuloj vidas bone, ke la tempoj aliĝis, ke devas veni la Interkompreniĝo de la nacioj, ke ne povas regi daŭre la malamo, kaj ke Esperanto estas potenca ilo por la kulturklopodoj de la homaro. Ili do ne nur plue lernu la lingvon, sed helpu ĝin laborante, abonante gazetojn kaj propagandante ĉie la ideon de Esperanto. Li finis hungarlingve al la neesperantistoj en la espero, ke ili ankaŭ konvinkiĝis, ke Esperanto estas facile lernebla lingvo, ne plu utopio, sed realaĵo.

Post tondra aplaŭdo ekstarigis kun sia gitaro s-ano Miĥaelo Sárossy kaj la stariginta aŭskultantaro entuziasme kantis la himnon. Ankaŭ la estraro kun s-ano Giesswein kunkantis. Tiel bele kaj solene ankoraŭ ne aŭdiĝis tie la „Espero“.

Poste salutis hungarlingve la ĉeestantojn ĉefsekretario Laquer per longa, subjektiva parolado, klarigante la praktikan uzeblecon de nia lingvo, rakontante la historion de malriĉa knabo kaj ties vojaĝo al Nederlando. La parolado ekvekis grandan bonhumoron.

S-ano Baghy per belega parolo salutis siajn lernantojn, kiuj tuj respondis per mirige flua parolado kaj transdonis la komunan bildon de la lernantaro por memoro. Baghy ankaŭ disdonis al ĉiuj lernantoj librodonacojn, kiujn kelkaj membroj malavare donacis por tiu celo, precipe li mem.

Oni volis denove aŭdi la kanton de Sárossy, kaj li devis kanti tri kantojn.

Post alvoko de s-ano Balkanyi al la novaj samideanoj porti la stelon, labori kaj aliĝi al UEA, aŭdiĝis krioj: Ni aŭdu Kaloscay! Kaj li devis deklami el sia verkaro. En majesta silento oni aŭskultis la belegan tradukon de fama balado de Arany: La velsaj bardoj. Denove tondris aplaŭdo. La festenon fermis per kelkaj vortoj d-ro Rácz.

La aŭskultantoj restis fidele ĝis la fino, ankaŭ kelkaj el la journalistoj. Ĉi tio estis depost jaroj la unua okazo, ke tagjournaloj sendis kunlaboranton al esperanta aranĝaĵo kaj poste du el ili, „Az Ujjág“ kaj „Világ“ skribis longan bonvolan raporton pri la festo. Tiu ne sufiĉe taksebla sukceso estas dankota al la antaŭlaboro de la Hung. Esp. Servo, kies fervora kunlaborantino, Terinjo Tamás, kiu cetere ankaŭ ekzamenis, nelaciĝeble propagandis per artikoloj ĉe la budapestaj redakcioj.

Esperantologio kaj Esperantologoj.

De Eugen Wüster.

Por determini la esencon de tiu ĝis nun nur embrie ekzistanta scienco, kiun ni nomas Esperantologio, necesas antaŭe mallonge skizi la formidean strukturon de la eŭropaj-amerikaj kulturolingvoj, per kies sintezo naskiĝis Esperanto. Ĉar en Esperanto dank' al la konstanteco forma kaj idea de l' vortelementoj en ĉiuj kombinoj tiu strukturo kvazaŭ radioskopie elrelefigas, sufiĉas, se ni ĉi tie limas niajn detalojn al ĝi.

Kiel ĉiu vorta lingvo ĝi estas sistemo de artiklitaj akustikaj signoj, per kiuj oni laŭ konvencio nomas la homajn ideojn, speciale komprenajojn aŭ konceptojn, t. e. la ĝeneraligitajn ideojn. Certaj el tiuj ideoj ricevis kiel signon nedivideblajn terminojn, la vortelementojn; aliaj estas simbolataj de starantaj*) kombinaĵoj de vortelementoj, ĉu plurelementaj vortoj aŭ kunmetitaj vortoj en la pli vasta senco, ĉu starantaj vortogrupoj. Ĉiuj tri nomadiloj estas ideosignoj, esprimoj, aŭ, ekradikinte, lingveroj.

Kvankam la formo kaj signifo de la vortelementoj estas unufoje por ĉiam fiksata (centre aŭ per la lingvuzo), la formo kaj la signifo de la kombinaĵoj de vortelementoj per tio nur parte estas antaŭfiksita: La rezultanta formo precipe

de la vortogrupoj ankoraŭ povas esti tre diferenca, kio multe malfaciligas la funkcion de la fiziologia-psikologia mekanismo de ideoreprodukto (signigo: parolado kaj skribado) resp. signopercepto kaj -interpreto (releigo: aŭdado kaj legado, kompreno) kaj tial estas forliginda kaj -ata per nova fikso.

La rezultanta signifo precipe de la plurelementaj vortoj devas iel kombiniĝi el la signifoj de la vortelementoj, la elementaj signifoj, libera tamen ankoraŭ estas la interrilato inter la elementaj signifoj: la interelementa rilato; laŭ ĝi ni diferencigas naŭ tipojn de plurelementaj vortoj laŭ la interelementa rilato. Por ke la signifo de iu plurelementa vorto estu plene fiksita, do du fiksoj estas farendaj: necesas decidiĝi, kiu estu la interelementa rilato kaj krome ofte, kiel la signifon tiel ricevitajn — la limsignifon — oni volas plie malvastigi.

La unua el tiuj fiksoj ofte ne estas farebla pokaze sed farenda pokategorie, ĉar determinita traktado de nombro de analogiaj plurelementaj vortoj postulas, ke pri la ceteraj analogiaj oni procedu same. Tiuj vortelementoj, kies interelementa rilato al la antaŭiranta vortelemento tute ne plu estas pokaze fiksebla sed estas por ĉiuj ajn kazoj jam konvencie antaŭfiksita, estas la sufiksoj*)

*) Ekzemple ... ino ĉiam = ino de ... ina ... ; tial la plej multaj esperantistoj rifuzas formojn kiel junino (por junulino = ino de junulo), kiu estas plene akceptebla, se oni allasus la interelementan rilaton ino juna.

kaj finaĵoj, tio estas ilia sola logika diferenco kompare kun la ceteraj vortelementoj, la radikoj. Se kunmetitaj vortoj konsistas el pli ol du (ĉe la tipo „kompletigitaj prepoziciaj formitaĵoj“ tri) vortelementoj, ĉio dirita estas aplikenda ne al la du (tri) vortelementoj, sed unue al du vortoduonoj (ĉe la enkrampa kazo la unua vortoduono estas duparta), kiuj siaflanke estas dismeteblaj en vortelementojn; nenio ŝanĝiĝas, ĉar la interduona rilato estas egala al la interelementa rilato de la lastaj vortelementoj de la du vortoduonoj. Laŭ tio, kiel oni faras la duonigon — la tranĉon — pli-ol-du-elementa vorto povas havi plurajn signifojn.

[Ĉar estas versaĵne, ke esperantistoj ne havantaj grandajn spertojn pri la funkciado de sia lingvo — ankaŭ pro la neebleco doni ĉi tie ekzemplojn*) — ne povos diventi la utilon de la prezentita konsidermaniero, ni aldonas, ke tiun teorion, elirante de la sama punkto kiel Antido, ni disvolvis tiom, ke por homo konceptinta ĝin nenie en la praktiko plu ekzistas problemoj rilate la formidean flankon (tio koncernas ankaŭ la naciajn lingvojn); kaj tiuj interrilatoj inter formoj kaj ideoj ĉe kombinaĵo samtempe estas la sola gramatiko de la esperantisto. Ni scias, ke multaj ne ŝatas tian pritakton de la lingvaj aferoj kaj preferas sole fidi al la „instinkto“; sed ili pripensu,

*) Tial oni trovas multenombro en nia libro **Konstruo kaj disvolvo de Esperanto** (t. e. la unua volumo de nia vortaro de Esperanto, vidu pli poste la rilatan piednoton).

*) = regule revenantaj.



La sekvanta vesperon estis agraba kunesto en la kafejo Kovacs, kie parto de la lernantoj denove festis samideanon Baghy kaj d-ro Loránd per parolado vokis ilin plue resti fidelaj batalantoj por Esperanto.

Ankaŭ ĉi tiun nokton, kiel la antaŭan vesperon, laŭ vorto de „Az Ujzág”: „la esperantaj melodioj sekvis nin forirante sur la strato kaj super ni — mirinde — sur la ĉielo ekbrilis aro da malgrandaj, ridentaj verdaj steletoj . . .”

Espereble tiu ĉi festo ne restos nur momenta ekbrilo, sed ĝia dolĉa memoro fariĝos neforges- ebla en la koroj de ĉiuj ĉeestantoj kaj instigos ilin vivi kaj labori, pensi kaj esperi per kaj por Esperanto.

Praha.

Kelkaj statistikaj nombroj.

Ĝis la 6-a de julio aliĝis 2100 partoprenantoj, ĝis la 12-a jam 2197, inter ili: 1 alĝeriano, 4 argentinianoj, 5 aŭstralianoj, 70 aŭstroj, 13 belĝoj, 1 braziliano, 68 britoj, 50 bulgaroj, 1186 ĉe- slovakianoj, 45 danoj, 4 danziganoj, 1 estono, 11 finnoj, 85 francoj, 259 germanoj, 25 hispanoj, 40 hungaroj, 41 italoj, 2 japanoj, 12 jugoslavianoj, 3 kanadianoj, 2 litovoj, 70 nederlandanoj, 12 nor- vegoj, 62 poloj, 9 rumanoj, 2 rusoj, 1 sudafrikano, 111 svedoj, 34 svisoj, 2 turkoj, 4 usonanoj, 5 ukrainoj kaj 1 urugviano.

Laŭ profesio la kongresanoj estas: 356 ofic- istoj, 201 instruistoj kaj -estroj, 189 laboristoj kaj metlistoj, 126 komercistoj, 103 studentoj, 36 pro- fesoroj, 30 inĝenieroj, 22 advokatoj kaj juĝistoj, 19 kuracistoj, 14 redaktoroj kaj ĵurnalistoj, 12 art- istoj, 10 pastroj; 155 havas diversajn profesiojn, 215 estas sen difinita profesio.

(Laŭ komunikoj de s-o V. Cimr, sekr. de la L. K. K. en Praha.)

Esperanto kiel telegrafa lingvo.

Laŭ sciligo de la ĉeĥos. poŝtministerio (n-o 39758/XI. de 27. VI. 21) konsentas pri enkonduko de Esperanto kiel telegrafa lingvo por la tempo de la XIII-a Esp. Kongreso de 31. VII. ĝis 6. VIII. jenaj ŝtatoj kaj telegrafkompanioj: Ĉeĥoslovakio, Norvegio, Hispanio, Svisio, Brazilo, Germanio, Sudafrika Unio, Italio, Rumanio, Grekio, Belgio, Danio, Portugalio, Britio, Nederlando, Hungario, Luksemburgio, Aŭstrio, Egiptio, Nova Zelando, Svedio, Aŭstralia Ŝtatumio, Marconi Wireless Tele- graph Co. — La prezroj kiel en aliaj lingvoj. — Do telegrafu, geamikoj, el Praha diligente!

— La fervojlinio Bohumin (Oderberg) — Košice (Kassa) konsentis rabaton de 80 %.

Atentu! Antaŭkongresanoj! Ĝelnstruistoj!

Vizitu la Esperanto-lecionon kun Dresdenaj ĝelernantoj la 28-an de julio, posttagmeze je la 8-a en salonego de la 9-a popollernejo ĉe Georg- platz, proksime de la kongresejo. Legu la inviton de „Esperanto-Vereinigung deutscher Lehrer“ en la akceptejoj de „Vereinshaus“.

Edukista Internacio.

La francaj delegitoj de „Edukista Internacio“ aranĝos en Praha la 6. aŭg. la Internacian Kon- greson de la antaŭenema Edukistaro.

Ili ĉeestos antaŭe — se tio estos ebla — ĉe la faka kunveno de la esp. ĝelnstruistoj.

Ili petas do — je la nomo de la franca ĝe- instruista sindikata federacio — ĉiunaciajn antaŭ- enemaĵn ĝelnstruisto-asociojn, sendi oficialajn dele- gitojn al la Unua Tutmonda Kongreso de Eduki- sta Internacio.

Tagordo: 1. Statutoj de Edukista Internacio. — 2. Pri internacia faka revuo esperante eldon- ota. — 3. Konsekvencoj de la milito en lernejo. — 4. Diversaj demandoj (aliĝo de E. I. al la Tria Internacio de l' Sindikatoj; tagordo de la proksima kongreso, ktp.).

Adreso de la franca federacio: A. Testud, in- struisto, 50, rue de la Loire, Firminy (Loire).

unue ke per tia vere fidebla instinkto nur tre mal- multaj estas naturdoĉitaj kaj ke do necesas almenaŭ pro la aliaj trovi instrueblan formulon por la post- uloj de tiu instinkto, kaj due ke ofte malgraŭ ĉio la instinkto, t. e. sento (neklara sciado) pri ana- logiaĵoj, de malsamaj personoj celas al malsamaj direktoj, tiel ke sen preciza kriterio de korekteco akordigo ne estas ebla.]

La Sinteza Lingvoscienco koncerne la inter- naciajn helpilingvojn havas la taskon decidi, ĉu (aktive: kiu) esprimo (iu el la mondsinonimoj resp. memstare kunmetita ideosigno) estas la plej taŭga por nomi donitan konceptaĵon. Por tio precipe tri postuloj devas esti plenumitaj:

1. la praktika postulo de interkompreno (la pli vastan formuladon vidu pli malsupre), nome ke la enkondukanta efektive eknomu tiun koncept- aĵon, kiun eknomi li pretendas, kaj ne (nekonscie) substituu al tiu konceptaĵo alian; pri la nacia- esperantaj vortaroj tiu postulo aperas kiel la leksikografia postulo kontraste kun la sekv- antaj, la esperantologiaj postuloj. Tiu postulo bedaŭrinde en Esperanto estas pli ofte lezata ol kontentigata.

2. la postulo de kiel eble plej granda inter- nacleco forma kaj ideo. Pro la pseŭdointer- nacleco, t. e. internacleco forma sed ne ideo, tiu postulo tute ne estas tiel facile kontentigebla kiel ŝajnas. Necesas apogi sin minimume sur la kvar ĉefaj fontolingvoj de Esperanto: A (145 milionoj da parolantoj), F (50 mil.), G (77 mil.) kaj R (100

Tutmonda Monkolekto por Monumento al D-ro L. L. Zamenhof.

Internacia Komitato:

Iniciatintoj:

Prof. Th. Cart, Paris.
Generalo Sebert, Paris.
D-ro W. Robin, Varsovio.
S-o Ed. Stettler, Bern.

Organiza Komitato:

S-o J. M. Warden, Edinburgh.
S-o Advokato W. M. Page, Edinburgh, 31 Queen Street, Hon. Kasisto.
S-o J. D. Applebaum, Liverpool, 11 Mayville Rd., Mossley Hyll, Hon. Sekretario.

La supre nomita Internacia Komitato formiĝis por kolekti la bezonatan monsumon per sistemo de kupon-kartoj (vidu apartajn notojn „La projekt- ita plano“), kaj en Varsovio starigis loka komitato, kiu prizorgos, sub la kontrolo de la Internacia Komitato, la konstruon de la monumento kaj ĝian konservadon. Ĉe la Kongreso en Praha la sekv- anta rezolucio estos proponata en la nomo de la iniciatintoj:

„La XIII-a Kongreso de Esperanto, okazinta en Praha la 1.—6. aŭgusto 1921, decidas, ke estas necese konstrui indan monumenton sur la tombo de d-ro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, kaj rekomendas la projekton de la iniciatintoj al la sindona subteno de la tutmonda esperantistaro.“

La sekvanta alvoko estas direktata al ĉiuj samideanoj kaj simpatuloj, kun plena konfido, ke la kongreso en Praha aprobas la projekton, kaj kun la espero, ke la tutmonda esperantistaro sub- tenos ĝin tutkore.

Lazaro Ludoviko Zamenhof estis unu el la geniuloj de la mondo. Tioŝ la historio baldaŭ konstatos. Li donis al la homoj la internacian lingvon, Esperanto, kiu jam realigis la malnovan revon je tutmonda lingva kompreno kaj vekis ĉe siaj adeptoj senton de homa interfratigado. Lia verko forte enradikiĝis en miloj da koroj tra la tuta mondo kaj jam portis fruktojn en la rilatoj de homoj el diversaj popoloj kaj lingvoj, rasoj kaj kredoj, kaj en la laboro de sindonaj samide- anoj, kiuj entuziasme klopodas ĝin disvastigi.

Ĝis nun lia tombo en la hebrea enterigejo en Varsovio atendas indan monumenton. Dum la lingvo, kiun li kreis, restos por ĉiam la plej nobla monumento, estas dece, ke sur lia lasta ripozejo la esperantistoj, kiuj lin amis kaj admiris, starigu monumenton, altrangan je digno kaj edifo, kiu simbolligos tiun amon kaj admiron, kiel lan-epok- farantan elpensitaĵon.

La celo de la nuna alvoko estas havigi la subtenon de la esperantistoj por la monsumo bezonata por tiu unika memoraĵo. Neniu dank- ema koro detenu sin de la afero de eĉ sumeto por tiu bela celo. Kiel la poloj, liaj samlandanoj, alportis el ĉiuj anguloj de sia lando bulojn da tero por monumento al Kosciuszko, la pola nacia heroo, tiel ankaŭ el ĉiuj anguloj de la mondo ĉiu esperantisto alportu sian moneron por la kon- struo de monumento sur la tombo de la kara Majstro.

Por la desegno de la monumento estas mal- fermata internacia konkurso, kaj la jam starigita komitato en Varsovio prizorgos la konstruon. La mono kolektita estos uzata por la monumento, kaj, se restos sumo, por alia taŭga memoraĵo. La projekto estas aprobita de s-ino Zamenhof kaj la familianoj de la Majstro.

Dependas de vi, samideanoj, kaj de via bon- volo, ke la supra projekto efektiviĝu. Samideanoj, kiuj deziras sendi mononacojn rekte al la hon. kasisto, povas tion fari en sia nacia mono, kaj

mil.); plue el la ceteraj vivantaj lingvoj precipe sur la lingvoj H (65 mil.), I (42 mil.) kaj Port. (30 mil.).

3. konsidero de ĉiuj formaj kaj ideaj ana- logiaĵoj. Tio okazas per la sinteza labor- maniero, ĉe kiu ĉiuj analogiaj kazoj estas kune prilaborataj kaj ankaŭ samtempe kun unu membro de vort-familio estas formataj ĉiuj aliaj.

Ĉio ĉi valoras pri la sinteza lingvoscienco ĝenerale; kiam oni aplikas ĝin al la jam multe uzata sistemo Esperanto — Esperantologio — la tria el la eldiritaj postuloj pri taŭgaj ideo- signoj modifiĝas pri la kazoj (ili estas sufiĉe multaj), en kiuj jam okazis neanalogia trakto de analogiaĵoj: oni decidis pri la plej taŭga, de- klaros ĝin regula kaj modela, kaj la ceteraj (determininombraj!) kazoj bezonas esti nur kon- servataj en la memoro kiel esceptoj.

Krome aliĝas 4-a postulo, nome nova aspekto de la „praktika postulo“: konsidero de la lingv- uzo.

La praktika postulo de interkompreno diras, ke pli grava ol ĉio estas, ke iu, kiu volas indiki ideon (t. e. komprenigi ion) al aliulo, havu sub sia dispono adekvatan (plene korespondan) lingveron, kies ideon (t. e. signifon) lia inter- rilatanto aŭ konas aŭ povas trovi iel.

Tiu sola sed superrega postulo de la praktiko devas esti rangata antaŭ ĉiuj aliaj postuloj (2 kaj 3), eventuale eĉ por illaj kostoj.

kiam la kupon-kartoj estos presitaj, ili ricevos kvitance la kartojn aŭ la kuponojn laŭ la sumo donacita.

Por la Iniciatintoj kaj Organiza Komitato:
J. D. Applebaum, Hon. Sekretario.

La projektita plano.

Monkolekto per sistemo de kupon-kartoj.

La Organiza Komitato eldonos kupon-kartojn kun gravurita portreto de la Majstro, kaj kun teksto klariganta la celon.

Ĉiu serio de kartoj havos certan valoron konforme al la monsisistemo kaj la ekonomiaj kondiĉoj de la diversaj landoj. Ekz.: 20 ŝilingoj aŭ svisaj frankoj, 50 francaj frankoj, 100 ger- manaj mk. ktp. La karton ĉirkaŭos 20 kuponoj kun la sama bildo de la Majstro, ĉiu valoranta la dudekonon de la tuta karto. Oni povos do akiri aŭ plenajn kartojn aŭ nur kelkajn kuponojn. Tio donos la oportunon al ĉiu samideano kun- helpi tiom, kiom li kapablas.

La kartoj kaj la kuponoj estos la sola kvit- tanco al la pagintoj.

Kun la afabla helpo de la Naciaj Societoj Esperantistaj kaj de la reprezentantoj de UEA, tiuj kupon-kartoj estos disvendataj inter la esper- antistaro kaj la simpatiantoj tra la tuta mondo.

La Organiza Komitato starigos filiojn kaj agentojn kaj fiksoj iliajn kondiĉojn kaj respond- econ. La filioj kaj agentoj vendos nur plenajn kartojn; la vendadon de kuponoj prizorgos sin- donaj samideanoj, kiuj kompanse konservu la mezan parton de la kupon-karto kun la portreto.

Estos eldonata la kvanto da kupon-kartoj necesa por provizi ĉiujn vendistojn. Post sufiĉa vendo, la nevenditaj plenaj kupon-kartoj estos reprenataj. Ni taksas la bezonon je proksimume 500 sterl. pundoj.

La Organiza Komitato aranĝos la tutan kolektadon, okazigos internacian konkurson pri la monumento, ĝin mendos kaj pagos.

La Loka Komitato en Varsovio konstruigos la monumenton kaj zorgos por ĝia konservado.

La iniciatintoj devos aprobi ĉiujn gravajn decidojn.

La gazeto „Esperanto“ kaj aliaj esp. ĵur- nalaj ricevos regule informojn pri la progreso de la kolekto kaj la spezoj.

La Universalaj Kongresoj de Esperanto decidis pri la raportoj de la Organiza Komitato kaj pri uzado de eble restanta monsumo.

Por la Iniciatintoj kaj la Organiza Komitato:
J. D. Applebaum, Hon. Sekretario.

Ĉiuj esp. gazetoj estas petataj represi kaj sendi ekzempleron al la hon. sekretario.

Komercaj ĉambroj.

Konforme al la gravega decido de la Pariza komerca ĉambro (9. febr.), kursoj de Esperanto estas malfermitaj en kvar komercaj lernejoj; tri estas gviditaj de prof. Cart. Ili nun finiĝis kun kontentiga rezultato. La kursoj rekomenciĝos tuj de la oktobra malfermo de lernejoj, kaj, kon- sekvence, laŭ multe pli bonaj kondiĉoj ol ĉi tiun jaron. Sed, de nun, oni povas aserti, ke la ini- ciato de la komerca ĉambro jam sukcese frukto- donis. (Laŭ „Franca Esperantisto“.)

Virinoj.

La Pariza grupo de la franca „Ligo por voĉ- rajto de virinoj“, prezidata de la konata advokat- ino Maria Verone, aliĝis al la Pariza Grupo Esper- antista. La konsilantaro de francaj virinoj estos oficiale reprezentata en Praha de f-ino Gérard.

Ruĝa Kruco.

En Sézannes (Francujo) kurso de Esperanto estas farata por 40 membroj de la Ruĝa Kruco de lokomotiveŝto s-o Aussenac.

Se do jam multe uzita lingvero, trovebla en di- vers-lingvaj vortaroj, eble malpli ol aliaj propon- eblaj kontentigas la postulon 2, tamen estas malbone, hodiaŭ (almenaŭ private) anstataŭ ĝin per nova, kies signifo ne estas trovebla kaj kies enkonduko verŝajne kaŭzus multe da tempo- perdigaj diskutoj.

Se iu teorio povas helpi al plenumo de la eldirita praktika postulo, tiam ĝi estu benata; tiam ĝi ne estas malpraktiko, sed koncentrita praktiko, ordita tutsperato, vera scienco. Ĉar la signoj de vera scienco estas, ke ĝi estas puŝata de la brula deziro, registri kaj unuece ordi, do konsideri ĉiujn fenomenojn (logike: argumentojn) por havigi fidindan gvidon, kiel konduki ĉe ripetiĝo aŭ kvazaŭripetiĝo de ĉiu unuopa fenomeno, kaj ke ĝi ne kovras al si la okulojn antaŭ faktoj ne akordigeblaj kun la ĝis- nuna, „definitiva“ ordo.

Se nun ni rigardas, kiel la kondiĉoj de taŭgeco estas plenumitaj en Esperanto, ni konstata, ke tiel la praktika postulo (precipe kiel leksikografia), kiel ankaŭ la esperantologiaj (escepte eble la nur forman internaciecon), estis kaj estas mal- atentata en plorinda maniero, ke precipe pro malzorga traktado de la praktika postulo Esper- anto en la internacia trafiko ĝis nun neniel povas plenumi, kion ĉiutage disanoncas ĝiaj anoj.

(Ĝarigita.)

Pri Tasko de la Dektria en Praha.

Nia nova Organizado.

Alvoko al la Esperantistaro.

La XIII-a Kongreso devas decidi pri la proponoj de la XII-a en Hago rilate la organizadon de nia movado sur la bazo de Centra Oficejo kaj de UEA. Mirige, ke pri tiu grava demando ne estis dumtempe gazetara diskutado, kaj la oficialaj kaj ne-oficialaj delegitoj de la Praha kongreso kunvenis sen hejma preparado, sen scio de la ĝenerala opinio de la esperantistaro, kaj la hazarda humorsento decidigos pri tiu demando dum la kongreso.

Estas ne plu longa tempo; tamen kiuj ankoraŭ povas, priparolu tiun ĉi aferon hejme kun la samlandanoj, ke ili povu reprezenti en Praha efektive la opinion de la esperantistaro, kia ajn estos la plano pretigita laŭ decido de la XII-a per la prepara komitato de CO kaj UEA. Tute ja tio ne estas ebla. Kaj ĉiam povos okazi, ke kelkaj landoj aŭ societoj ne akceptos ian decidon de niaj universalaj kongresoj, ĉar la kongresanoj ne estas ĉiam la plej taŭgaj esperantistoj de la societoj, sed tiuj, kies monujo kaj libertempo permesas la vojaĝon tra landoj kaj malfacilaĵoj. Nur kelkaj societoj havas la feliĉon sendi indajn reprezentantojn, kaj partoprenos multaj izoluloj, kiujn neniu komisias. Do la voĉdonado dum la kongreso laŭ maniero okazinta en Hago ne donas garantion pri tio, ke vere la volo de la esperantistaro efektiviĝos. Ĝis nun oni ne parolis pri tio en la komuniko, ke nur — laŭ la sepa kongreso — deciditaj rajtigataj delegitoj povas voĉdoni. Tamen oni faru la eblon kaj antaŭe priparolu la proponojn kaj konfigu ilin (laŭ ekzemplo de la Pola Esp. Societo), ke ĉiu havu pretan opinion!

Nia movado bezonas organizon. Kaj ĝi ne estas ankoraŭ tiel forta, ke kelkaj homgrupoj povu flankenstarigi kaj aparte organizi ignorante la centron. Estos ja ankaŭ ilia profito, se nia movado per forta komuna organizacio plifortiĝas.

Do se oni starigas internacian organizadon de katolikoj aŭ de laboristoj ktp., per si mem necesaj kaj utilaj, bone; sed la membroj de tiuj organizacioj ne diru, ke ili ne aliĝas al la tutmonda organizacio, ĉar ili estas jam aparte organizitaj. Oni disorganizas la fortojn senbezone. Se oni rekonas la neceson de komunaj kongresoj (kaj al Praha kune iros katolikoj, laboristoj ktp.), oni devas ankaŭ rekoni la neceson de komuna organizacio nuntempa kaj krom al sia organizacio aliĝi kaj aliĝigi al la universala. Jes, kaj tiu ĉi organizacio povas esti nur la ĝisnuna UEA!

Oni diskutu pri reformo de la centro, pri kunfando kun la pariza — laŭ nomo oficiala, sed efektive sen tutmonda organizacio elektita, nur laŭ hazardo kaj laŭ monofero de kelkaj parizanoj tie starigita, cetere bona kaj nepre necesa — Centra Oficejo Esperantista; pri tio, ke la kapo de UEA estu duobla: unu por scienca gvidado, literatura, lingva, de la ĝisnuna CO en Parizo kun ĝisnuna sidloko, tute aŭtonoma, tamen nun jam havonta malantaŭ si organizacion; — la alia estu la administra, komerca, turisma, la nuna CO de UEA en Genève, ankaŭ en sia fako sendependa, aŭtonoma. Sur tia bazo oni povus kunfandi la du CO'ojn, kaj se ĉiu esperantisto aliĝus al la nova UEA rekonante ĝian egan gravecon, el la enspezoj ambaŭ CO'oj povus funkcii kaj ankaŭ ties universalaj kongresoj povus havi tutmondan eflkon.

Do pripensu! *Paulo Balkanyi.*

Esperanto en Polio.

(Raporto de Pola Esp. Servo.)

BYDGOSZCZ-Bromberg. La ĉi tiea ĉiutaga ĵurnalo „Deutsche Rundschau“ aperigis la 2-an de junio longan priesp. artikolon de s-ano Pankratz. Fratoj Feike el Oppeln (Supra Silezio) translokiĝis ĉi tien kun sia presejo.

JANWIEC-ZNIN. Propagandas s-ino Magdalena Nowak, instruistino ĉe la germana privata altlernejo.

ŁASZNO. Fervora propagando de s-o Monarczynski inter siaj kunseminarianoj. Malnova s-ano estas s-o Grodzki, nuntempe oficiro en la pola armeo.

ŁODZ. Ĵus finiĝis kurso kun 15 personoj. S-ano prof. Kronenberg vizitante hazarde la urbon ekzamenis la partoprenintojn, kaj ĉiuj ricevis la diplomon de kapableco.

POZNAŃ-Posen. Dua kunveno de ĵus fondita „Pola Esp. Societo“ okazis la 7-an de junio. Ĉeestis 25 personoj, inter ili 5 gastoj. S-o Borkowski parolis pri „Esp. Literatur“. Al la grupo aliĝis jam 52 anoj. — Dum la ĉi tie de 3.—9. junio okazinta foiro estis ankaŭ starigita esp. fako dank' al fervora propagando de d-ro Grosztyck. Inter la temoj ekspozitaĵoj dum la foiro per la „Komerca Lernejo Sw. Wojciech“ estis traktata de s-o Borkowski pri „Esperanto“ kaj „Komerco“. — Propagando per grandaj afiŝoj, kiujn oni pendigas ĉe ĉiuj afiŝkoloroj, en tramveturiloj kaj en la stacidomo.

SIEDLCE. Malfermiĝis filio de „Pola Esp. Soc.“ Vidu ET n-o 39.

TUREK. La 6-an de junio okazis sukcesplena parolado farita de s-ano prof. Kronenberg el Bydgoszcz. *Pregel, gvidanto de PES.*

Jara kunveno de UEA en Varsovio.

La 26-an de pasinta monato okazis en la ejo de la esp. soc. „Laboro“ (Wspolna 47) la jara kunveno de UEA-anoj. Kiel prezidanto de l' kunveno estis elektata d-ro W. Robin, sekretariis prof. d-ro A. Czubrynski.

La del. de UEA, Ad. Oberrotman, prelegis la jaran raporton, kiu prezentis tre riĉan materialon, multe da servoj, vizitoj de eksterlandaj gastoj ktp. La ĉeestantoj unuanime dankis la delegitojn pro la sindonema kaj senlaca laboro. S-o J. Litauer legis la lastan raporton kaj konatigis al la kunveno la lastajn triumfojn de Esperanto eksterlande.

En la diskutoj partoprenis s-oj K. Domaslawski, Jan Kostecki, Oberrotman, Litauer, Lonkopolanski. Oni parolis ankaŭ pri la Praha kongreso, kaj oni elektis kongresan komisionon. Diskutoj ankaŭ okazis pri venonta kongreso, laŭ propono de Helsingfors'aj, Danzig'aj kaj Kopenhag'aj samideanoj; fine okazis elektoj. La kunveno elektis denove kiel del. Ad. Oberrotman, kiel vicdel. J. Litauer.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Kataluna Esp. Federacio

preskaŭ reatingis sian antaŭan brilon kaj forton. La nuna nombro de federacioj estas 392, loĝantaj en 46 urboj kaj vilaĝoj tra la tuta Katalunio. Estas aliĝintaj al la Federacio 16 vivoplenaj grupoj, el Barcelona, Sabadell, Tarrasa, Girona, Reus, Tarragona, Vendrell, Manlleu, Santa Coloma de Farnés kaj Vilanova i Geltrú.

Post kelkaj monatoj (15.—17. okt.) okazos en Girona la IX-a Kongreso de la Federacio sub honora prezido de reĝo Alfonso XIII-a. Samtempe okazos la festo de la Floraj Lndoj kaj esp. ekspozicio. Estas eldonitaj belaj glumarkoj de la Kongreso kaj Floraj Ludoj kun alegorioj pri la historia urbo Girona.

Adreso por la Kongreso: S-o Francisko Hill, Parque Divisionario 7, Girona.

(Laŭ „Kataluna Esperantisto“.)

„Rapidkurso“ de Klubo Esperantista en Laihia (Finnlando)

antaŭ la pasinta mezasona festo daŭris tri tagojn kaj sukcesis bonege. La celo de la kurso estis doni bonajn konsilojn al komencantoj kaj konatigi ilin kun la ideo de lingvo internacia, kun la atingitaĵoj de Esperanto kaj ties utileco.

Alvenis partoprenantoj el paroĥoj Härmä, Jalasjärvi, Ilmajoki, Kurikka kaj Laihia. Nek la instruantoj nek la gelernantoj laciĝis, kvankam oni sidis ĉiutage de fruamatenino ĝis malfrua vespero kun nur mallongaj intertempoj.

Ĉefan akcentadon oni metis je korekta prononado de la literoj kaj legado kaj ĝenerala koncepto de la esp. gramatiko. Krom tio oni faris sep paroladojn. Instruis kaj paroladis laŭvice s-o A. Lehtinen (ideo de l' Internacia Lingvo), s-o J. V. Pukkila (pri la vivo de Zamenhof), s-o H. Salokannel (pri la disvastiĝo kaj praktika utilo de Esperanto) kaj s-o E. Koivisto (pri la loka esp. movado).

En la dua kursotago la partoprenantoj estis fotografataj de s-o H. Salokannel, kaj oni faris ekskurson al la ĉirkaŭaĵo, vizitis preĝejon, kie oni ludis orgenon, ktp.

La finimpreso estis tre ĝojiga kaj kuraĝiga. Plej oni admiris la grandegan fervoron kaj persistecon de la kursanoj. Certe ĉiu el ili fariĝos bona Esperanto-apostolo en sia loko. La sperto ricevita per ĉi tiu kurso montris, kiel gravaj estas tiaj kursoj por multaj memstudantoj. Iom pli longaj ili eble povus esti, eble 7-14 tagaj. Oni esprimis la deziron, ke la klubo ankaŭ estonte aranĝu samspecajn kursojn.

En la fino popollerneja instruisto A. Järveläinen en longeta, kora parolo dankis la instruintojn, kaj oni trinkis la disiran kafon, per kiu la dankemaj gelernantoj regalis siajn instruintojn.

Ĉar ĉie ja troviĝas komencantaj esperantistoj, kiuj ne bone scias ion aŭ alian, ni kun plezuro admonas la samideanojn, ĉiuloke aranĝi specialajn kursetojn por tiaj memlernantoj, kaj vi certe estos tre kontentaj. (—nn—)

Vizito el Kuba insulo.

S-o J. M. de Villa, vicdel. de UEA en Habana, kaj edzino, venintaj rekte el sia lando, la 7-an de julio vizitis la monatan kunvenon de la loka gruparo en Hamburg. S-o de Villa faris interesegan paroladon pri siaj unuaj impresoj en Germanujo kaj pri la granda diferenco inter Usono kaj Eŭropo rilate la propagandebacon de Esperanto.

Ni petas senkulpigon.

En la provizo de la redakcio estas ankoraŭ kelkaj bonaj artikoloj pri diversaj regionoj kaj urboj, kie okazos esp. kongreso, ekskurso ktp., ekz. pri Praha, Dresden, Karlsbad, Trentino k. a. Se iel eble, ni publikigos tiujn ĉi artikolojn; sed se la aktuala materialo restos tiel abunda kiel nun, ni devas preferi ĝin al la supre nomitaj artikoloj. Do ni petas senkulpigon, se la artikoloj ne povos aperi.

Depost oktobro aŭ plej malfrue novembro ET aperos en pli granda formato, sur pli bona papero kaj kun ilustraĵoj en ĉiu numero (precipe aktualaj esp. bildoj). Tiam ankaŭ artikoloj pri kongres-urboj ktp. havos pli gravan signifon, pro la aldoneblaj ilustraĵoj.

Internacia Esp. Servo.

LETERO EL BULGARIO.

Karlovo, julio 1921.

Lastatempe estis ĉe ni je tagordo la t. n. *trudova povinnost*, t. e. laborimposto, perioda fizika laboro plenumata senpage por la ŝtato de ĉiuj bulgaraj regnantoj de la 18-a ĝis 45-a jaro (anstataŭ militservo).

Tiun ĉi kuraĝan leĝdonan reformon, kiu havas karakteron de sociala eksperimento de laborservo, realigis la nun reganta agrarista registaro por tom faciligi la devojn laŭ la „pactraktato“ en Neully.

La laborservo donis rezultatojn, kiuj ne povas esti malatentataj. En ĉiu alia lando ĝi renkontus malhelpojn, sed en Bulgario, en kiu la servuto estis aplikata tutaĵn jarcentojn sub la turka reĝimo, la eksperimento ne estas kontraŭtradicia. Precipe en la vilaĝoj, en kiuj sepjara militado malhelpis la plenumon de multaj societ-aferoj, la laborpostoj donis bonegajn rezultatojn. Multaj stratoj, ĝardenoj, pontoj, kanaloj ktp. estis farataj aŭ riparataj.

Multaj konfesas, ke en tiu originala sistemo Bulgario trovis praktikan rimedon por mildigi la ekonomian krizon, kiu pezas super la lando. Kaj efektive, nur per la laboro estas eble restarigi la ruinigitajn ekonomiajn valorojn dum la du militoj kaj krei al la nacio kondiĉojn por pli intensa ekonomia progreso.

Interese estas konstati, ke la junuloj, kiuj estas vokataj por fari sian laborservon, ĝoje aperas. Ili scias, ke oni ne plu okupos ilin per pafiloj kaj kanonoj, ne plu instruos ilin mortigi, sed pasigos tra skolo de ekonomia edukado, post kies fino ne nur la regno havos profiton de ilia laboro, sed ankaŭ ili mem revenos en siajn domojn kun bonaj scioj pri la terlaboro kaj diversaj metoj kaj lernos amil sian landon.

La sola malhelpo, kiun unuatempe renkontas la labordirekcio ĉe la realigo de siaj taskoj, estas la manko de monrimedoj. Sed post 2-3 jaroj tiu mondemandado ne plu ekzistos, ĉar ĝis tiam la laboro tiel aranĝigos, ke de la modernaj maŝinaĵoj kaj laborejoj la Labordirekcio ne nur sukcesos subteni sin mem, sed donos ankaŭ bonan profiton al la regno.

Notinda estas ankaŭ la t. n. „Labora Lerneja Semajno“, pri kies rezultatoj eĉ la Ligo de la Nacioj tre bone parolas. Dum ĝi 600 000 gelernantoj en tuta Bulgario estis devigataj — kaj tion ili tre ĝoje faris — ŝtatlabori... Tiel multaj lernejoj ĝardenoj estis aranĝataj, la lernejoj purigataj. La lernantinoj ellaboris multajn brodaĵojn, el kies vendo estis pligrandigata la mondfondo por la malriĉaj lernantoj. La laboraĵo de la infanoj estas taksata je 100 milionoj levaj (1 lev = 0,80 g. mk.). Sed la ideo, ke la lernanto ne estas parazito kaj povas labori, estas pli valora ol la mono. De nun la infanoj mem postulos tian semajnon, ĉar ili estas kontentaj je ĝi.

Ankaŭ la arĥeologio gajnis de la supra novenkonduko. Multaj malnovaj kaj tre interesaj trovaĵoj estas faritaj dum la fosado de la laborservanoj. Ekzemple en monteto apud la marurbo Varna estas malkovrita tombejo. En ĝi estas trovita la skeleto de trakia knabino kun oraŭ orelingoj kaj ora ringo sur la maldekstra mano. La kapo kun direkto al oriento. Apud la kapo estis lampeto de teraĵo kaj tabletoj; apud la dekstra mano ludiloj, aveloj, kelkaj el ili konservitaj, kvankam ili restis tiom da tempo en la tero — 2200 jarojn. Ankaŭ apud la dekstra mano estis monero, ŝajne, laŭ la antikva kutimo donita por pagi al la Dio Herono pro la konduko trans la subteran riveron. Laŭ la trovita monero, kiel certigas profesoro Skorpil, la tombejo estas el la III-a jarcento antaŭ Kristo.

Alia valora fosaĵo estas farita en Sofio. Je kelkaj paŝoj sude de la enirejo al la preĝejo „Sankta Sofia“, la laborservanoj malkovris en ĝardeneto roman tombejon de granda antikva valoro. La tombo estas longa 2 metrojn 15 cm., larĝa 2 m. 10 cm., alta 1 m. 80 cm. kun keramika arkajo. Interne en la tombo sur blanka mortero estas pentritaj koloraj freskoj, kiuj estas valoraj verkoj de la arto. En la tombo estas trovitaj du skeletoj kaj du boteletoj — la pli malgranda lakrimoniujo (farmokonservilo), kaj la alia estas longeca kaj verŝajne servis por konservado de aromoj. La tombejo, pro sia antikva valoro, estas unika sur la Balkana duoninsulo. Ĝi datas de la unuaj jaroj de la Kristaneco, de antaŭ 1800, 1850 jaroj. Similaj tombejoj estas malkovritaj ĝis nun nur en Italio, en Pompei kaj Sirakuzaj.

Iv. H. Krestanoff.

Avizo. Pro la aktuala kaj eksterordinare interesa enhavo de tiu ĉi letero ni petas la ĉiulandajn samideanojn pri nepra traduko kaj publikigo en naciaj gazetoj. Bonvolu sendi po 2—3 ekzemplerojn de la koncerna gazeto kun la tradukaĵo al la redakcio de ET.

Sporto.

La Olimpiado en 1924.

La 8. julio oni proponis al la franca parlamento leĝoprojekton laŭ kiu la ŝtato konsentu krediton de 40 mil. fr. por la olimpiado okazonta 1924 en Paris. — Kontraŭ la decido, alprenita antaŭ kelkaj monatoj en Genève, okazigita la olimpiajn ludojn 1924 en Paris, interalie protestis Italio, ĉar tio signifus ekskludon de sportistoj el landoj batalintaj dum la milito kontraŭ Francujo kaj tial ne ebligus konkurson vere internacian inter la tutmondaj sportistoj.

Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja enpresado la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

ESP. SIGELMARKOJ. Kolekto de 215 diversaj sigelmorkoj ĉiuj eldonitaj de ml. Mi sendas kontraŭ 5 pesetoj en hispana mono aŭ 12 respond-kuponoj. Joan Amades, Peu de la Creu 15, Barcelona, Hisp.

VORTARON GERMANAN-ESPERANTAN de prof. Christaller deziras tuj aĉeti s-o Josef Mader, Brockmann-gasse 71, Graz, Aŭstrio.

P. MEDEM, KOVNO. Forveturonte baldaŭ eksterlanden por ĉ. 2 monatoj, mi petas, ke miaj simpatiaj gekorespondantoj prokrastu la interkorespondadon ĝis oktobro. Saluton!

GEINSTRUISTOJ. S-o L. Borkowski, instruisto, Poznan, ul. Rozana 4a, Polujo, preparolonte temon pri instruistino, petas informi lin, kiel la afero staras en aliaj landoj (germanajn kondiĉojn li ankaŭ suflue konas), speciale ĉu instruistinoj havas la saman a) nombron da devigaj lecionoj semajne, b) salajron kiel instruistoj samaĝaj.

POR GRUPA LEGADO tre taŭgas la „Ses noveloj el la hungara literaturo“. Poŝtformato. En letero sendebla. Interesa. Bonstila. Sendu 3 germ. mk. aŭ 1 fr. fk. en letero kaj vi ricevos ĝin registrite senditan. Paŭlo Balkanyi, Budapest VI, Hung. u. 15-II-2.

FEROVISTOJ! La eldono de fervoja fakvortaro estas nepre necesa. Kolekto de tiajn fakvortojn skribante ilin sur ŝlipoj (105x80 mm) nur unuflanke kaj sendu ĉion al Ober-Gütervorsteher Ernst Muthschall, Forst, Germ., Gubenerstr. 28. — La ordinaraĵ vortoj jam estas traduktaj. Alsendo de fervojaj regularoj ktp. estus danke akceptata.

RUSIO. Al s-oj Najdin en Omsk kaj Valentinov en Ĥerson. Mi danke ricevis viajn presadojn kaj sendis al vi rekomendite interŝanĝon, sed ĝi revenis kun surstampo „Non admis“. Volu informi min pri la vojo, per kiu mi povas ree sendi ilin al vi. Iv. Krestanoff, Karlovo (Bulg.).

DESEGNANTOJ ATENTU! Ni intencas eldoni malkarajn kolorajn poŝtkartojn esperantajn. Desegnaĵoj kaj ideoj serĉataj. Oni skribu al Fratoj Feitke, Bydgoszcz (Polio), Petersona 11.

MIGRADO TRA TATRA. Mi serĉas kamaradon (kongresano de la XIII-a), kiu post la kongreso partoprenos en dektaga piedmigrado tra la Alta Tatra. Bonvolu skribi al s-o H. Kappellmann, Dresden. Queckbrunnen 4, III.

ANEKDOTARO. Jus aperinta: Anekdotaro, kolekto de ĉ. 500 anekdotoj, en Esp. traduktita el la germana kaj ĉeĥa lingvoj de prof. J. Štusser, direktoro de la urba esp. lernejo Saaz (Ĉeĥoslovakio). Bonega legaĵo por komencantoj kaj progresintoj. Eldonisto: J. Kern, Saaz (Ĉeĥoslovakio). Prezo kr. ĉ. 5.— (mk. 5.—).

POSTOFICISTOJ. 100 lernantaj gepoŝtistoj bavaraĵ deziras korespondi esperante kun gekolegoj eksterlandaj. Oni petas, sendi adresojn al J. Jacob, supera poŝtadministristo, München 3, paketpoŝtoŝicejo (Paketpostamt), Bavarujo.

RAKONTETOJ. A. Mexin, 65, Grand'Rue, Montreux (Svis.) petas sendi al ŝi ĉiulandajn rakontetojn aŭ legendetojn. (Jam posedas rusajn, germanajn kaj francajn.) Respondos per bela avisa vidaĵo aŭ alia aĵeto el Svisujo.

ESPERANTISTOJ EN PARIZO. Hispana samideano bezonas malgrandan, ne meblitan loĝejon en Parizo aŭ ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ankaŭ li serĉas laboron kiel lignajisto. La pasintan jaron li loĝis en Parizo kaj parolas francan lingvon. Se iu afabla kamarado povas ĝin oferti al li, sciligu ĝin al jenaj adresoj: Marguerite Peitl, 26 Boulevard de la Chapelle, 10 arrd., Paris, aŭ s-o Johano Compte, strato Lazareto 32, Barcelona, Hispanio.

PETO. 2 junaj antverpenaj instruistoj deziras migri per biciklo tra Germanio al Ĉeĥoslovakio dum sia granda libere tempo (aŭgusto-septembro). Volontege ili loĝus unu nokton ĉe diferencaj samideanoj dum la migradvojo. Kluj bonvolus akcepti ilin, estas afable petataj skribi al s-o Fr. Loiry, Wilrycksche vest 76, Antverpeno, Belgio.

EDZIĜO. Laboristo, ĉ. 38-jara, deziras konatiĝi kun samaĝa esperantistino de kiu ajn nacieco por eventuala edziĝo. Alekriboj kun fotografiaĵo estu adresataj al s-o D. Holm, Källgatan 4, Eskilstuna, Svedio.

EDZIĜOPETO. Tridekjaraulo deziras edziĝi al fraŭlino aŭ vidvino, kiu laboras por la esp. lingvo; ŝi devas esti preskaŭ samaĝa. Sendu portreton, poste mi sendos la mian. Mi estas laboristo. S-o Mariano Donto, str. Prado 110, Habana, Kuba.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

(Dufoja enpresado kostas la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

Otto Weselmann, Düsseldorf, Nordstr. 77, II., interŝanĝas pensojn pri karikaturo-desegno kaj reklam-desegno, per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj.

S-o Ljudas Alseika, Siauliai, Litovio, Pasadna g-ve 19, interŝanĝas per poŝtkartoj (bfl.).

F-ino Eugenia Butnevičaitė, Siauliai, Litovio, Stotes g-ve 8, interŝanĝas kaj korespondas per poŝtkartoj (bfl.).

F-ino Zofia Valčekauskaitė, Siauliai, Litovio, Pasadna g-ve 19, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bfl.).

S-o Michel Ambros, Rusio, Petrogrado, Zabalkanski 55, deziras korespondadi pri anarkismo, socialismo, religio, lingvistiko, amo, seksa demando; li povas korespondi pole, esperante, ruse, angle, japane kaj france.

Kiu deziras korespondadi kun samideanoj de Simbirsk, Rusio, skribu al M. S. Kleverov, Simbirsk, strato de Leono Tolstoj 55.

S-o Cugliolo Jean, 5 avenue de la Liberté, Courbevoie (Seine, Francujo), deziras interŝanĝi poŝtmorkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Sérot, 16 rue Guillaume Bertrand, Paris 11, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. kaj poŝtmorkojn kun ĉiulandaj samideanoj.

S-o Sava Stojanov deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun ĉiulandaj samideanoj. Adreso: str. Opalcenska 6, Sofia, Bulg.

S-o Artur Tamar, Bydgoszcz (Pol.), Blonie 5, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmorkojn, gazetojn en esp. kaj naciaj lingvoj kun la tuta mondo. Al ĉiu respondos.

S-o Jozef Wawrzynski, Bydgoszcz, ul. Rycerska 5, Polio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj (precipe kun fraŭlinoj). Interŝanĝas ankaŭ papermonon kaj poŝtmorkojn.

S-o Izaak Spiro, lernanto, Zoppot bei Danzig, Kronprinzenstr. 4, Persänlich, deziras korespondadi kaj interŝanĝi poŝtmorkojn, papermonojn kaj monbiletojn.

Arbeiter-Esperantisten-Gruppe, Breslau (Germ.), Brandenburgerstr. 16; ĝiaj 50 membroj deziras korespondi kun ĉiulandanoj letere aŭ karte pri ĉiuj temoj; ĉiam respondos.

S-o Max Rudolph, Plauen i. V. (Germ.), Wieprechtstr. 52, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. kun la tuta mondo; ĉiam respondos.

S-o Max Pepperl, Plauen i. V. (Germ.), Neundorferstr. 176 (20-jara) deziras korespondadi precipe kun junaj fraŭlinoj en la tuta mondo. Tuj kaj la tutan jaron ĉiam nepre respondos.

ARGENTINIO.

Reprezentadon de ĉiuspecaj komercaĵoj, facile vendeblaj en Sudameriko, nur de kapablaj firmoj unuaklasaj, akceptas eksoficisto teknika de la Argentina Terkultura Ministerio. Konatiĝis bonege dum 7 jaroj kun la fieaj ekonomiaj cirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi tie reveturos Argentinon, trapasonte okcident- kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Kelety, Szászsebes (Sebesul Sasesc), Transsilvanio, Rumanio; poste: Kelety-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentinio.

Centrifugaj Pumpiloj

Vapor-Turbinoj, Vapor-Kaldronoj,
Vapor-Maŝinoj, Tubo-Konduktilaroj,
Leviloj, Transportiloj,
Maŝinoj por Sukerfabrikejoj,
Reservejoj,
Movigliaro, Fandajo, Kradostangoj

estas fabrikataj de

Fratoj Stork & K-io

Hengelo (O), Nederlando.

Fabriko kun pli ol 2000 laboristoj.
Esperanto korespondata.

Nur petoj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.

II-a Internacia Foiro de Reichenberg

Ĉeĥoslovakio.



13.-21. de aŭg. 1921.

Unua kaj plej granda kvalita merkato de la tuta grandindustrio de Ĉeĥoslovakio. Proksimume 5000 ekspozantoj de la en- kaj eksterlando. Plej bona kaj plej malmultekosta okazo por aĉetoj en 20 diversaj branĉoj. Pasportaj faciligoj, fervojaj rabatoj, apartaj vagonaroj. **Komerca debito de la I-a Foiro 3/4 miliardoj kronoj ĉsl.** Vizito de la Foiro estas bone kunigebla kun la vizito de la XIII-a Universala Esperanto Kongreso en Prago, kun la vizito de la famekonataj nord-bohemaj banurboj kaj de la foiro de Leipzig.

Informoj:

Messeamt Reichenberg

Ĉeĥoslovakio.

Venu al Reichenberg kaj vidu la praktikan uzon de Esperanto ĉe la foiro.

Franco

kun bonaj referencoj komercaj deziras

reprezenti en Paris

eksterlandajn firmojn pri ĉiuj

komercaĵoj

kaj produktoj. Donos komercajn informojn pri francaj komercaĵoj. Perfektaĵ diskreteco kaj honesteco.

Adresu ĉion al

S-o Emile Béchet

28, rue Leroyer, Vincennes (Paris).

Esperanto-Verlag Berlin S 59

Friedrich Eilersiek --- Wissmann-Str. 46
(Germanujo).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

„Esperanto-Praktiko“

ĉiumonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondkuponon aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.

Reprezentadon de ĉiuspecaj komercaĵoj, facile vendeblaj en Sudameriko, nur de kapablaj firmoj unuaklasaj, akceptas eksoficisto teknika de la Argentina Terkultura Ministerio. Konatiĝis bonege dum 7 jaroj kun la fieaj ekonomiaj cirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi tie reveturos Argentinon, trapasonte okcident- kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Kelety, Szászsebes (Sebesul Sasesc), Transsilvanio, Rumanio; poste: Kelety-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentinio.

Romualdo Colivicchi

Skulptisto

VOLTERRA, TOSCANA, ITALIO.

Premiita laborejo por skulptaĵoj en

Castellina Marmoro

(Alabastro).

Specialaĵoj:

Polikromataj artist-laboraĵoj, lampoj, vazoj, objektoj por elektra iluminado.

Ĉiuspecaj artist-laboraĵoj estas ĉiam preparataj. Oni deziras agentojn kaj reprezentantojn en ĉiuj landoj.

Oni korespondas en Esperanto.

Libra kaj Arta Presejo

Emil Friedr. Adolph

Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 58.

Fabrikado de bonkvalitaj artpresaj prospektoj kaj de ĉiuj presaĵoj por komerco kaj industrio en ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive Rusa kaj Esperanta.

Oni petu oferton.

Korespondado: Esperante, Angle, Franco, Germane ktp.

SILKAJ BRODAĴOJ

REKTE EL ĤINUJO,
. LA SILKOLANDO!

Esperanto-brodaĵo kun surskriboj esperantaj, verda stelo, globo ktp.

Bibliaj brodaĵoj kun sanktaj tekstoj.

15 : 20 aŭ 29 : 39 cm * dol. 2.50 aŭ 4.50.

Brodaĵoj de birdoj, floroj, vidaĵoj ktp. samformataj kaj samprezaj.

Specialaj laboroj laŭ modelo.

Sendo per rekomendita letero.

Dol. 1.00 = 10 stamp. respond.-kup. aŭ 3 ŝilingoj, poŝtmandatoj aŭ kambioj de Thos. Cook & Son.

Specimeno kontraŭ 1 resp.-kup.

C. S. Gee,

HAI-YEN (tra Shanghai), Ĥinujo.

Korespondado en Esperanto!

Samideanoj!

Sciligu al mi tuj adreson de

S-o Valentin Polakov

dum 1914 en Kamiŝin, strato Krasnaja ulica, Rusujo, Saratovskaja gub., gimnaziano, kiu verŝajne troviĝas en pola militkaptiteco. Elspezoj danke pagataj.

Resp. al A. Zednik, Berlin W 9. Potsdamer Platz 3, ĉe Tschechoslowakischer Bankverein.

Sciencaj libroj en Esperanto:

D-ro Vöröss: Geometrio absoluta.

Tri grandaj volumoj po 22 germ. mk.

Paulo Balkanyi, Budapest VI, Hung.,
Hajos u. 15-II-2.

KOMERCISTA

ESPERANTO-GRUPO

Freiburg i. Br., Katharinenstr. 14

peras ĉiuspecajn negocojn. — Rilatoj al gravaj germanaj firmoj. Perado senkoste. Uzu niajn servojn!